# La Bulteneto

Numero 73 - Esperantojaro 138 Nummer 73 - Jahr 2024

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN




# Svedaj Taleroj en Germana Regno

# La Bulteneto

Numero 73 Esperanto-jaro 138
Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
Tekstoj: Renate kaj Walter Klag
esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo
Portreto de la sveda reĝo Gustav Adolf el vikio;
titolpaĝo de la libro „La Tridekjara Milito” de Dick Harrison;
en Augsburg, Nürnberg kaj Osnabrück pregitaj Taleroj
kun la portreto de la sveda reĝo.

# Svedaj Taleroj en Germana Regno

La svedoj pregis Talerojn en Germanio – ĉu tio povas esti vera? Unue ni devas scii, kio estas Talero.

Sen mono neniu moderna socio povas funkcii. En la 17a jarcento nepre necesis metalaj moneroj. Ekde la romia epoko la plej uzataj moneraj metaloj estis oro, arĝento kaj bronzo. Fine de la 15a jarcento en Tirolo, tiam parto de la Germana Regno, mankis oro, sed arĝento estis grandkvante je dispono. Tial oni pregis arĝentan moneron, kies valoro estis la sama kiel ora dukato. Ankaŭ en Sankt Joachimsthal, hodiaŭ Jáchymov en norda Ĉeĥio, oni pregis tiajn monerojn. Ilia nomo estis Sankt Joachimsthaler Groschen (groŝo el Sankt Joaĥim-valo; T(h)al signifas valo), mallonge Talero. Tiu vorto estas ankoraŭ konata en Usono: Dollar.

Talero estis kvazaŭ universala monero kaj konsistas el pli ol 80 % da arĝento. Ĝia maso estas ĉirkaŭ 29 gramoj, ĝia diametro 40 mm aŭ pli. Ne nur en Germana Regno, sed ankaŭ en aliaj landoj oni pregis Talerojn, parte ili havis aliajn nomojn. Tallero (= 5 Lire) en Italio kaj Eritreo, Écu [ekű] en Francio, Riksdaler en Svedio kaj Rublo en Ruslando estis kompatiblaj kun Talero.

La Tridekjara Milito, pli precize sinsekvoj de diversaj militoj, komenciĝis 1618. Interalie temis pri milito inter la protestantaj svedoj kaj la katolikaj germanoj.

Gustav Adolf naskiĝis 1594 en Stokholmo. En la jaro 1617 li iĝis la sveda reĝo Gustav Adolf la Dua. Kiel protestanto li havis la ideon liberigi Germanion el la katolika-papa superregado.

La ĉefa kontraŭulo de Gustav Adolf estis la habsburga imperiestro Ferdinando la Dua. Tiu naskiĝis 1578 en Graz [grac]. Ekde la jaro 1619 ĝis la morto li estis imperiestro de la germana regno kaj vivis en sia palaco en Vieno.

1621 Gustav Adolf konkeris la urbon Riga (hodiaŭ la ĉefurbo de Latvio), 1627 li forpelis la imperiestrajn trupojn el Wismar en norda Germanio. 1631 la svedoj invadis Bavarion (Bayern) en suda Germanio. 1632 la svedaj trupoj estis en Nürnberg, kies enloĝantoj entuziasme bonvenigis la svedan reĝon. En la sama jaro la svedoj estis en Augsburg (Bavario). En novembro 1632 mortis Gustav Adolf en la batalo ĉe Lützen proksime de Leipzig. 16 jarojn poste subskribiĝis la pac-kontrakto de Münster kaj Osnabrück kaj baldaŭ ĉesis la bataloj.

La svedoj en Germanio bezonis funkciantan ekonomion kaj pregis monerojn, interalie Talerojn. Dum aŭkcio de la renoma aŭkciejo Dorotheum en Vieno ni povis la 16an de novembro 2023 aĉeti tri Talerojn, kiuj montras la portreton de Gustav Adolf la Dua.

La unua estas pregita en Augsburg 1632.
La averso aŭ portretflanko (svede åtsida aŭ framsida) montras brustbildon dekstren de la reĝo en kiraso.

Ĉirkaŭe oni legas latine "GVSTAV ADOLPH D G SVECO GOTHO VANDALO REX MAG".
Gustav Adolf de graco de Dio granda reĝo de la svedoj, gotoj kaj vandaloj.




Aliflanke, sur la reverso (svede frånsida aŭ baksida), latine "PRINC FINLAND DVX - ETHO ET CARDOM ING".
Princo de Finlando, duko de Estonio kaj Karelio, lordo de Ingermanland.
Meze la blazono de Svedio kun krono. Supre la jarindiko 16 32.
La cembra strobilo sube meze estas la simbolo de Aŭgsburgo "Augsburger Stadtpyr".

Maso 29 g, diametro 42 mm.

Prezo de la monero 659 € (7580 svedaj kronoj).

La strobilo de Augsburg: Goole > augsburg stadtpyr




La dua estas pregita en Nürnberg 1632. Simila portreto, sama teksto.
La sespinta stelo supre sur la averso estas la simbolo de Nurenbergo.

Maso 29 g, diametro 42 mm.

Prezo de la monero 683 € (7850 svedaj kronoj).



La tria estas pregita en Osnabrück 1633 por memorigi la mortinton.
Sur la averso estas latine menciita ÆTA TIS SVÆ 38. Lia vivdaŭro 38 jaroj.
Reverse estas citita la evangelio de Johano, ĉapitro 10, en la germana: IOHAN 10 EIN GVTER HIRT LESSET SEIN LEBEN FVR DIE SCHAAFFE OSNABRVGK +1633+. Bona paŝtisto donas sian vivon por la ŝafoj. Osnabrück 1633.

Maso 28 g, diametro 44 mm.

Prezo de la monero 976 € (11220 svedaj kronoj).
Gustav Adolf donis sian vivon en batalo.
Lia heredaĵo estas la ekzistado de la protestantismo en norda Germanio.

-----------------

Alia sveda reĝo mortis dum milito: Karl la 12a.
Tio okazis 1718 dum la Granda Nordia Milito.
Karl naskiĝis 1682 en Stockholm. Ekde 1697 ĝis sia morto li estis reĝo de Svedio kaj hercogo de Bremen kaj Verden [ferdn].
En marto 1700 komenciĝis la Granda Nordia Milito. Rusio, Danlando kaj Saksio surprize atakis Svedion. Karl rezignis pri ĉia pompo kaj koncentriĝis tute al la milito. Lia strategio estis ataki nur unu malamikon kaj poste alian. Tio sukcesis kontraŭ Danio, Saksio kaj Polando, sed ne kontraŭ Rusio. Vane li sieĝis la urbon Christiania (hodiaŭ Oslo). Dum la dua sieĝo de la fortikaĵo Frederikshald (meze inter Oslo kaj Gotenburgo) en la jaro 1718 trafis lin kuglo. Li estis tuj morta. Ne estas klare, el kiu direkto venis la kuglo.






La monero pregiĝis 1700 en Stockholm. La nominalo estas 2 Mark.
La averso aŭ portretflanko montras brustbildon dekstren de la reĝo en mantelo, kun peruko.
Ĉirkaŭe oni legas latine "CAROLUS XII D. G. REX SVE".
Karl la 12a de graco de Dio reĝo de la svedoj.

Aliflanke, sur la reverso, tri svedaj kronoj, jarindiko, nominalo 2 M (du markoj) kaj HZ.
HZ estas la inicialoj de Henrik Zedritz. Li estis estro de la monerfarejo (myntmästare) Stockholm de 1700 ĝis 1706.

Maso 10 g, diametro 30 mm, materialo arĝento 694/1000.

Du markoj estis plimalpli duona Riksdaler (Regna Talero). Detaloj:
sv.wikipedia.org/wiki/Riksdaler

Prezo (Dorotheum, novembro 2023) 244 € (2810 svedaj kronoj).

Renate KLAG kaj Walter KLAG

# Bitte beachten Sie auch die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag

# Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 67, Novembro 2023



La unua nubskrapulo en Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**www.esperanto-gbg.org**

## Tre leginda magazino el Svedio

www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_Jxurnalo_n-ro_68.pdf

# LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO




Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 120 €.




50 Steloj  Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 89 €.




100 Steloj  René de Saussure, eldonita 2018, prezo 89 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al  esperanto@chello.at.




Die Münze Österreich AG
Wien 3., Am Heumarkt 1
Pregejo de la arĝentaj
100 Steloj kaj 50 Steloj

# STELO-TABELO

| Nominalo | Materialo | Maso | Dia-metro | Jaro | Eldon-kvanto | Prezo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 Stelo | Bronzo | 3,4 g | 20 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 5 Steloj | Latuno | 5,0 g | 23 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 10 Steloj | Cu – Ni | 9,0 g | 28 mm | 1959[1] | 5000 | 40 € |
| 25 Steloj | Cu-Ni 75-25 | 19 g | 37 mm | 1965 | 1000 | 200 € |
| 25 Steloj | Ag 900/1000 | 25 g | 37 mm | 1965 | 5000 | 200 € |
| 25 Steloj | Au 983/1000 | 50 g | 37 mm | 1965 | 10 | 5000 € |
| 1 Stelo | Plasto ruĝa | 0,8 g | 23 mm | 2012 | 3000 | 1 € |
| 3 Steloj | Plasto flava | 0,9 g | 25 mm | 2012 | 3000 | 3 € |
| 10 Steloj | Plasto verda | 1,3 g | 29 mm | 2012 | 3000 | 10 € |
| 100 Steloj | Ag 999/1000[2] | 31,1 g<br>1 unco | 37 mm | 2018[3] | 1000 | 89 € |
| 50 Steloj | Ag 925/1000 | 30,0 g | 40 mm | 2020 | 300 | 89 € |




Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.
Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.
Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.
Informo pri la aktualaj prezoj ĉe esperanto@chello.at. Kelkaj moneroj estas ne tuj livereblaj.

---

[1] Pregitaj en la jaro 1960
[2] La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.
[3] Pregita en la jaro 2017

# Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko” (EN), probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum dek jaroj ĝis 167 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo en 45 landoj.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidos poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”

# Esperanto en Vieno

Vizitu niajn renkontiĝojn en la hejmeca, tipe Viena kafejo AIDA
en la naŭa distrikto, Währinger Straße 47.
La aktualajn informojn vi ricevas de
esperanto@chello.at




La kafejo AIDA
Haltejo Spitalgasse de la tramlinioj 5, 33, 37, 38, 40, 41 kaj 42



# Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage**

Im selben Haus befindet sich auch die
**Musikaliensammlung**
und das
**Globenmuseum**